

# THE BRITISH ESPERANTIST

WITH WHICH IS INCORPORATED  
INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXIX, No. 333.

January, 1933.

## NOVJARA SALUTO DE LA PREZIDANTO

Elkoran bondeziron al ĉiu Esperantisto brita, pri sano, forto, kaj sukceso dum la jaro 1933 !

Ni estas sur la sojlo de nova jaro : ĝi estos ankaŭ, mi opinias, jaro de progreso. De antaŭlasta Septembro dum multaj monatoj ni trapaſis, kvazaŭ en noktiĝo, la "Marcon de Monkrizo." En la lastaj monatoj, tamen, denove iom ektagiĝis. Sub niaj piedoj nun sentigas pli firma tero, kaj ĉiuj denove kuraĝigas.

En la mallumo multaj revis pri la pli bona tempo, kiun ili atendas. Sed iuj el la revantoj nemalkuraĝigebles kaj persiste ankaŭ laboradis, por certigi la alvenon de tia tempo—por *realigi* la revon. Jen, en la ĉi-suba artikolo de nia Afergvidanto, vi vidos la rezulton de multe da pensado dum la malfacila periodo, kaj de monatoj da zorga kaj taktoplena traktado kun gravaj firmoj kaj entreprenoj.

Post la legado vi certe konsentos, ke la verketo estas kiel subita sunbrilo sur antaŭe nebuleta pejzaĝo. Ni klare vidas la vojon irotan ! Studinte la proponojn, ni vidos ankaŭ la *devojn*, kiuj *atendas nian laueble plej fortan penadon*.

La homaman idealon de nia Majstro Zamenhof, kune kaj individue—ni helpu akceli, ĝis glora plena efektiviĝo.

ROBERT ROBERTSON.

## SUCCESS WITHIN OUR REACH

A year ago we were in the throes of the financial crisis. Even the most optimistic of us was pessimistic for the time being. Expenditure was cut as far as practicable, and we prepared for a very difficult time. Thanks to the loyal support of the great bulk of our members, we have pulled through, and our accounts for 1932 will be more satisfactory than they have been for many years. We start 1933 full of hope, and I am sure that when we are able to reveal full details of the plans referred to below, even the most pessimistic Esperantist will become an optimist. Personally, I firmly believe that if we take full advantage of the opportunity open to us, we shall enrol thousands of new Esperantists, we shall solve all our financial difficulties, the consequent appeals for funds will disappear, and we shall be able to do more for the realisation of the ideals of Dr. Zamenhof and the final victory of Esperanto than we have ever been able to do before.

We have two problems to solve : (1) that of convincing people that Esperanto is now more than a theory ; that it is a living language which is definitely useful, and is recognised as such by important

concerns ; (2) that of drawing the attention of the great mass of people to the existence and utility of the language.

The first one is being solved in this way. With each issue of the *British Esperantist* during 1933 we intend to distribute a booklet or leaflet *in Esperanto* issued by some important firm or body in this country. With this issue will be found a single-page leaflet published by The Bonnington Hotels Ltd. With the next issue we shall distribute an eight-page booklet published by Thomas Cook & Sons Ltd. With the March issue—but for special reasons we don't want to give names too far ahead. Members and subscribers will receive these regularly, and we are sure that they will appreciate the support being given to Esperanto by some of the most important firms in the country. We hope that, whenever possible, readers will give reciprocal support to the firms concerned.

At least four firms have already agreed to co-operate in solving the second problem. Messrs. Dean & Dawson Ltd. have kindly consented to place at our disposal the windows in almost all of their branches throughout the country for Esperanto exhibitions. Such exhibitions will last a week in each case, the actual details being a matter for joint arrangement between Messrs. Dean & Dawson, the B.E.A., and the local group. The B.E.A. will provide the material necessary, and groups in towns where Dean & Dawson's have a branch should communicate with us, in order that full details may be given and suitable dates arranged.

We regret that we cannot give details of the other plans, which will start on February 1st, until next month. But this we can definitely say : They will bring Esperanto to the notice, not of hundreds or thousands of people, but of MILLIONS ; and they will give us the first opportunity we have had of reaching the bulk of the inhabitants of these islands.

Are we to lose this opportunity ? That would easily be possible, as while these things will bring Esperanto to the notice of millions, they will not explain *why* people should learn it, nor give an address from which information can be obtained. They will certainly very much increase the number of replies we shall receive to our advertising, and it is essential that we should run the advertising campaign *at the same time, and as extensively as possible*. We have prepared a splendid booklet to send to enquirers, and we hope to receive requests for information from thousands of these. This is our great opportunity. Every Esperantist, rich or poor, should help to his or her utmost capacity. If you can, send along a donation for the advertising fund. One member sent along a collection of foreign stamps, which we sold for the fund—others may be able to do likewise. Have a book of 3d. tickets, and sell them if you can, or buy one or two yourself weekly. If everyone does his best in this great effort, we may not need to appeal for donations and guarantees after this year. The following sums have already been gratefully received :—

	£ s. d.		£ s. d.
Previously acknowledged	14 14 7	Barnes, C.	.. .. 0 10 0

	£	s	d		£	s	d		
Belcher, R. ..	..	0	3	0	King, T. ..	..	0	2	3
Bluett, T. L. C. ..	..	0	2	6	Lake, T. J. ..	..	0	5	0
Borel, Miss A. ..	..	0	10	0	Mann, J. W. ..	..	0	10	0
Bourdillon, F. B. ..	..	0	10	0	Mell, G. ..	..	0	10	0
Buchanan, G. D. ..	..	1	0	0	Paul, R. ..	..	0	1	0
Buckhaven Soc. ..	..	0	10	0	Railton, Mrs. C. E. ..	..	0	10	0
Haberfield, F. C. D. ..	..	0	10	0	Venn, A. ..	..	0	15	0
Helliwell, Mrs. L. de L. ..	5	0	0		Worden, Miss P. W. ..	..	0	10	0
Hulme, A. J. H. ..	..	0	2	6					
Iu .. .. ..	..	0	4	0	Total at Nov. 30th ..	<u>£26</u>	<u>19</u>	<u>10</u>	

Now it is your turn. May we hope for *at least £250* by the end of January?

There is much other work to do besides collecting the money, inserting the advertisements, and sending information to enquirers. These will be put into touch with local groups and federations, where such exist. Arrangements should be made for organising classes under competent teachers when necessary. In many towns groups do not yet exist. In each of these there ought to be a Delegate to whom enquirers can be referred. Competent Esperantists willing to fill these positions, in towns where a B.E.A. Delegate does not exist at present, are invited to write for full particulars and offer their services without delay. When an opportunity like this knocks at our door we must not lose it, either through insufficient enthusiasm to find the money—despite the difficult times—or through incomplete organisation. A real effort now means victory—not in ten years' time, BUT IN 1933.

C. C. G.

## 24th BRITISH ESPERANTO CONGRESS

Oxford—Easter, 1933.

*Patrons* : H.R.H. The Duke of Connaught, K.G.; His Worship the Mayor of Oxford (Alderman G. H. Brown); Sir Michael Sadler, K.C.S.I., C.B.; Professor Braun Holtz; Councillor Rev. John Carter, Dr. A. D. Lindsay, C.B.E., Master of Balliol College, Professor J. R. Tolkien, and A. Barratt Brown, Principal of Ruskin College.

*Excursions*.—On Easter Monday there will be a whole-day motor-coach excursion to Kenilworth, Warwick and Stratford. Fare, including lunch and tea, 9/6.

There will also be a half-day excursion on the same day to Legendary Berkshire. Fare, 5/-, including tea.

*Lodgings*.—Private Lodgings will be 5/- bed and breakfast. Comfortable Hotels, 7/6 bed and breakfast. Clarendon Hotel, 10/6 to 13/- bed and breakfast. Randolph Hotel (Congress Headquarters), single room 7/6, double 15/-, without breakfast.

*Ball*.—Ball tickets will cost 2/-, which includes running buffet.

*Diservo*.—This will be led by S-ro W. Severn, of Worcester.

*Order Forms* for lodgings, excursions, and ball, will be sent out in February.

*Join the Congress Now*.—Subscriptions (3/6) should be sent direct to the Congress Secretary, J. F. Brendel, 89 Dene Road, Headington, Oxford.

# COME WITH US

TO THE

## JUBILEE CONGRESS IN COLOGNE

July 29th-August 5th, 1933.

**ROUTE.**—*Via* Harwich—Hook of Holland.

Leave London (Liverpool Street Station) about 8.30 p.m., Friday, July 28th, arrive Cologne about mid-day Saturday.

Return fare with our party, 2nd Class throughout, £6. Saloon on steamer, return, 17/6 extra.

Passengers from the Midlands and North may join at Harwich, in which case the fare will be £5 10s. 0d.

(*Note.—These fares are based on present exchange rates and may change.*)

The tickets are valid for one month and allow independent return. Cheap tickets to London or Harwich from the provinces will be obtained for those who require them.

**ACCOMMODATION IN COLOGNE.**—Hotels will be available at from 6/- per day for bed and breakfast. A limited amount of private accommodation at from 4/- for bed and breakfast will also be available.

Cost of Meals: Lunch 1/6-2/6, Tea 1/-, Dinner or Supper 1/6-3/-.

**BOOKING.**—You may join the party now by paying a minimum sum of 10/-. Further payments may be made, with a minimum of 5/-, at any time you like, thus enabling you to save the money at your own convenience.

**ELBERFELD.**—We have made arrangements for a party to spend the following week at Elberfeld. The inclusive cost for board, hotel, and all excursions is £5. No extra rail fare required. This party is limited to 40 persons.

*These arrangements are open to B.E.A. members only.*

If sufficient bookings are received, we shall run special trains and a special ship. Book early and enable us to ascertain whether this is practicable. It will add to your comfort.


**ENROL NOW FOR OUR COLOGNE PARTY.**

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.,  
142, High Holborn, London, W.C.1.

## KOLONJO VOKAS POR JUBILEA KONGRESO

Oni ne bezonas diri al britoj, ke Kolonjo estas interesa urbo, kaj ke Rejnlando estas unu el la plej belaj regionoj en la mondo. Inter la centmiloj da eksterlandanoj, vizitantaj ĉiujare Kolonjon kaj Rejnlandon, troviĝas ĉiam granda procentaĵo da britoj. Kaj inter la britoj, pilgrimantaj en ĉiu jaro al la plej romantika rivero de Eŭropo, estas ĉiam ankaŭ multaj gesamideanoj. Ĉu ili sentas sin bone tie? Demandu ilin mem—ni ne dubas pri ilia respondo!

Ja ĉe la Rejno ekzistas ne nur interesaj urboj, grandiozaj katedraloj, ĉarmaj vilagoj, belegaj perspektivoj, montetoj, rokoj kun kasteloj kaj ruinoj—ĉe la Rejno ekzistas ankaŭ gajaj, gastamaj homoj, ĉe la Rejno ekzistas suno, kantoj, kaj bonhumoro.



KOLONJA KATEDRALO.

La venonta Universala Kongreso, la 25-a, la Jubilea Kongreso de Esperanto, estos la plej bona okazo por britaj gesamideanoj viziti, aŭ refoje viziti, Kolonjon kaj Rejnlandon: Kolonjon kun ĝia impona katedralo, ĝiaj riĉaj trezoroj de neimagebla valoro, ĝiaj preĝejoj, muzeoj, pontoj, ĝiaj kurbaj stratetoj, larĝaj bulvardoj, ĝiaj parkoj, ĝardenoj—Rejnlandon kun ĝiaj mil mirindajoj (vidu supre!), ĝia viglo kaj vivo.

La urba estraro fervore subtenas la preparojn por la kongreso. La jubilean kongreson invititis la ĉefurbestro D-ro Konrad Adenauer, homo energia kaj vasthorizonta, kaj ankaŭ la prezidantecon en la Loka Kongresa Komitato akceptis unu el la urbestroj de Kolonjo, S-ro Bönnner. La kongrespalaco de la urbo, kiun oni disponigas al la esperantistaro en la lastaj Juliaj kaj unuaj Aŭgustaj tagoj de la nuna jaro, estas ampleksa, moderna kaj praktika, kaj situas tuj apud la

Rejno kaj apud granda parko, vid-al-vide kun la fama katedralo kaj la pitoreska Kolonja Rejn-panoramo. Tie en la venonta somero disvolviĝos internacia vivo ; tie la "kavaliroj de la Verda Stelo" el trideko-kvardeko da landoj renkontiĝos por festi sian Arĝentan Mondfeston ; tie la pioniroj de la internacia lingvo denove unu fojon aranĝos grandiozan manifestaĵon, por pruvi al la mondo, ke la Turo de Babelo jam estas detruita.

Cu estas utile, doni kelkajn detalojn pri Kolonjo ? Eble tute mallonge ! Jen :

Kolonjon fondis en la jaro 38 a.Kr. la Romana generalo Marcus Vipsanius Agrippa. En 50 p.Kr. ĝi ricevis la nomon "*Colonia Claudia Ara Agrippinensis*" kaj urbajn privilegiojn. En la mezepoko Kolonjo estis dum longa tempo unu el la plej fortaj kaj plej brilaj urboj en la mondo. Ĝia komerco iris al Grekujo, Hungarujo, Orienta Germanujo, la Nederlandoj, Norda Francujo, Anglujo, kaj Danujo. Ĉiuj riĉaĵoj de Azio kaj de l' Oriento, la varoj kaj artaĵoj de l' Sudo, havis en Kolonjo sian ĉefan deponejon, antaŭ ol ili daŭrigis sian vojon alilandен. Speciale gravaj estis la rilatoj kun Anglujo. Jam en la 12-a jarcento la Kolonjaj komercistoj havis en Londono sian propran ejon, la "Gildhalon," poste nomitan "Stalhof," ĉar tie oni "stalis," t.e. ekzamenis kaj kontrolis, la varojn laŭ ilia kvalito kaj valoro. Malfeliĉe, pro sia fortikaĝa karaktero, en pli nova tempo Kolonjo ne bone progresis ; sed post la forigo de la fortikaĵoj ĝi klopodas postfari en malmultaj jaroj aŭ jardekoj tion, kion ĝi ne povis fari dum jarcentoj antaŭe.

Nuntempe Kolonjo havas 740 000 loĝantojn, estas la ĉefa fervoja kruciĝejo en Okcidenta Germanujo, havas gravan komercon kaj gravan industrion, universitaton, bonajn teatrojn, 25 bankojn, 40 konsulejojn, kaj grandan fremdultrafikon. En la jaro 1930 vizitis ĝin 558 000 fremdutoj, inter ili 130 000 eksterlandanoj, kiuj venis parte por negocaj celoj, sed grandparte ankaŭ kiel turistoj, por rigardi ĝiajn vidindajojn kaj tiujn de la proksimaj Rejn-valo kaj montaroj. En la nunjara somero inter la eksterlandanoj oni atendas unuavice partoprenontojn de la Esperanta Kongreso, kaj precipe multajn britojn. La pordegoj de l' kongresejo estos vaste malfermitaj al vi.

Aliĝu baldaŭ ! Venu multnombro ! Koran bonvenon al Kolonjo, la metropolo de Rejnlando kaj—nunjare—ankaŭ de Esperantujo !

M.

## THE B.E.A. ANNUAL REUNION

The Council Meeting on January 28th, 1933, will be followed by a Tea and Social Evening at 5.30 p.m. at The Westminster Café, General Buildings, Aldwych, W.C.1. It is hoped that as many members and friends as possible will attend. Tickets, price 2/6 each, may still be obtained from the B.E.A. office. When ordering, state whether meat or fruit tea is required. A fine programme is being arranged by the North London Esperanto Club.

# INFLUENZA AND HEAVY COLDS

*Very remarkable results are given by the use of Quinisan in the early stages of Influenza, Colds and Tonsilitis.*

*One eminent Medical Authority says:*

'The effect of (QUINISAN) was so remarkable that attacks of Influenza which began on the first day with shivering and temperature up to 104° F. and which were treated about mid-day only showed a little over 98·6° F. on the following morning and were entirely free from fever and all discomforts by the afternoon.'

'These observations are based on 50 cases.'

'Quinisan had no unpleasant by-effects and when administered in the first 24 hours is an absolutely reliable remedy for cutting short the attacks.'

Ask your Chemist for Howards'

# QUINISAN

Sold in bottles of 20 and 80 tablets.

HOWARDS & SONS LTD. (EST. 1797) ILFORD  
Makers of Howards' Aspirins, Quinine, &c

# PARNASA GVIDLIBRO (KIEL FARIĜI POETO)

K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Eldonita de "Literatura Mondo."  
176 pp., tole bindita, 65.

Ci tiu verko konsistas el kvar partoj. Parto I (*Skizo de Esperanta metriko*) enhavas detalan poezian fakterminaron, kun klarigo pri diversaj rim kaj ritmo-reguloj, kaj pri ŝvebo, glito, stumblo, piriko, enklitiko, kaj aliaj neregulaĵoj. La klasado de rimspecoj estas aparte interesa. Sekvas iom fantazia ĉapitro pri sonharmonio, kaj pledo por okaza gramatika libereco. Ĉu, post studio de la 46 kleregaj paĝoj pri versoj oksitonaj kaj paroksitonaj, amfibrakaj, sapfaj, kaj alkajaj, oni iomete pli bone kapablos verki poemon en la praktiko, estas dubeble. La aŭtoroj rajte diras  
*Ni donas ĉion, krom genio.*

Kredeble franco, por kies lingvo la skando laŭ akcentitaj silaboj estas fremda, trovos en la ĉapitro pli da helpo, ol anglo, kies patra lingvo tiurilate similas Esperanton. Resume: oni devas observi la ordinarajn regulojn pri rimo, ritmo, kaj belsoneco, kiujn pli-malpli sentas instinkte eĉ infano angla aŭ germana sen teknika scio. Tamen, kiel ĉe angla poezio, de tempo al tempo diskreta neregulaĵo estas permesebla kaj eĉ bonvena, por eviti monotonon. Kompreneble, la verkado laŭ metrikoj klasikaj efektive postulas apartan studadon.

Sekvas Parto II: 27-paĝa poemo sub la titolo *La Arto Poetika* (Kial ne Poezia?). Ĝi enhavas tre sagajn konsilojn pri elekto kaj trakto de temo, stila klareco kaj flueco, ritmoj, rimoj, asonancoj, kaj uzo de metaforoj, kun atentinda averta kontraŭ troa apostrofado; kaj finiĝas per elokventa pledo por enkonduko de novaj radikoj helpaj al la poeto. Se tia didakta verko, pro sia naturo mem, apenaŭ povas esti poezio, ĝi tamen estas versajo ĉiel admirinda, kaj tre altnivela.

Parto III konsistas el tre plena *Esperanta Rimaro*, kun resendo ankaŭ al parencaj rimoj. Teknikaj vortoj apartiĝas sube de la paĝo.

Parto IV, *Poezia Fakvortaro*, estas listo de pli ol 600 proponataj vortoj ne troveblaj en la Plena Vortaro de S.A.T. El tiu amaso da vortoj mi citos specimenojn aranĝitajn laŭ diversaj kategorioj; tamen la klasado estas necese subjektiva kaj arbitra, ĉar neniu du Esperantisto same taksus ĉiun vorton.

(a) Vortoj Zamenhofaj, aŭ jam tre uzataj, kaj sendube bonaj: *altruismo, dekalogo, derviĝo, eseo, falto, gracila, ingenio, insinui, iriti, kaneli, kejlo, kiosko, lanĉi, mesaĝo, pikniko, rigi, rivelis, skolto, sledo, stabila, stumbli, ŝminki, ŝutro, telepatio, teozofio.*

(b) Vortoj "ĉe la pordo"; kredeble uzindaj aŭ provindaj: *adolta, agresi, bebo, bunta, censo* (popolnombrado), *desaponti, ensemblo, eskapi, etoso, evento, flako* (puddle), *fraŭdi, hasti, kampanjo, liki* (leak), *masakri, moroza, nano, negi, obteni, pojno* (manradiko), *polmo* (manplato), *plongi, predo* (prey), *prizonio, responsi* (to be responsible), *sinki, spuro, suspiri* (sigh), *tajpi* (=mašinskribi: radiko vere utila, ĉar *stenotipi*=to use a shorthand machine, kaj *(steno)tajpistino* estas pli praktika, ol *stenografist-mašinskribistino*).

(c) Dube bonaj: *apreci* (pli bona ol *aprezi*), *ascendi, descendii, blazo* (senutila apud *bobelo*?), *femina, maskula, futuro, gazono* (razeno?), *opresi, skati* (patini?).

(d) Koloroj: *beja, falva* (fulva?), *glaŭka* (marverda), *iriza* (čielarka), *lila* (siringa), *rufa*.

(e) Bestokrioj: *bei* (safe), *gaki* (ansere), *jelpi* (hunde), *kriki* (akcipitre), *meki* (kapre), *kviki* (pepegadi), *ronroni* (to purr).

(f) Agoj: *baumi* (rear), *bavi* (slobber), *hauli*, *krabli* (iri kiel multpieda insekto), *mungi* (nazpurigi), *pauti*, *pluki* (florojn), *trampli, trepidi* (forte skutremi), *vringi* (premtordi).

(g) Vortoj specialaj: *lekto, peplo, tirso*, aŭ teknikaj: *hardino, kroki, marketri, morilo, stompi*.

(h) Vortoj kun difino diskutebla aŭ dube ĝusta: *anglikano, ensemblo, gracila, hurti, konvento, morbida, notico, piero, sandviĉo, sekulara, snopo, tranco*.

(i) Vortoj plursencaj, kaj tial—almenaŭ sen precizigo—evitendaj kaj malutilaj: *Ambigua, leĝera, licenco, magra, niĉo, rara, sinistra, violenta.* Se *fajna* havas kvar malsamajn signifojn, ĝi ne taŭgas por lingvo internacia.

(h) Interjekcioj : *ba, baj, bas, ēit, eh, ej, ek, fu, he, hej, hoj, hola, hop, hu, huj, huš, oj, pum, ruk, stop, tju*. La Esperanta interjekciaro estas kampo herboplena, sed ankoraŭ nekultivita. Jen kuraĝa provo ĝin ekplugi. Sed ĉu la proponata nuancaro ricevos generalan akcepton, oni povas iom dubi.

Parenteze : apud *ha, he, ho*, oni kelkafoje renkontas *ah, eh, oh*, neakcepteblajn pro la neprononcebla "h." Pli fonetikaj estus *āh, ēh, ōh*, aŭ simplaj *A, E, O*.

(i) Por dudeko da esprimoj rilatantaj la generajn aŭ ekskreciajn organojn de vira aŭ virina korpo, kaj ties funkciadon, oni proponas alternativajn formojn—eĉ plurajn—por "familiara" uzo. Tiaj vortoj makulas la libron, kaj ilin proponi estas ofendo al la leganto. Kia estas la meno, kiu sercas "poezian" ekvivalentojn de *fekego* kaj la ceteraj el tiu gento ! Pri tiu fakvortaro de la bordelo ni decide maldankas.

(j) Forme notindaj estas *erota, erupti, fantasta, fiki, gimnasto, konversi, plektro, situi, spekti*, almenaŭ pro la principe aprobinda evito de finaĵoj *aci, ator, ik, iv, um*. Ĉu *koktajlo* estas pli bona ol *koktelo*, aŭ *degni ol dejni* ? Easto kaj uesto ne ŝajnas tute kontentiga solvo de problemo konfese malfacila.

(j) Nova radiko anstataŭ uzo de afikso. *Aromato* (aromaĵo), *citato* (citaĵo), *devori* (manĝegi), *enorma* (grandega), *fola* (frenezeta), *guno* (bovidino), *humida* (malseketa), *kutelo* (tranĉilo), *latrono* (stelisto), *orgoja* (fierega), *pado* (vojeto), *parcimona* (trošpara), *povra* (kompatinda), *sikario* (murdisto), *spago* (snureto), *taŭro* (virbovo), *taverno* (drinkejo), *tepidia* (varmeta). La ĝenerala libera enkonduko de tiaj duoblaĵoj estus granda bato por nia lingvo. Ju pli oni forigas la pure Esperantajn formojn, kaj anstataŭigas ilin per t.n. "internaciaj" radikoj, des pli oni ŝtonigas la lingvon, despli oni forprenas ĝian ĉarmon, simplecon, kreskpovon, eĉ vivon. La trovo de novaj rimoj por la poeto ne estas sufici kompenso por tiu krimo. Ĉiu senutila duoblaĵo signifas novan malfacilaĵon por la komencanto, novan hezitigilon por la parolanto, kaj novan problemon por la konsciencia stilisto, kiu demandas al si pri ebla diferenco inter la sinonimoj. Kie halti ? Ni jaluze gardu nian vortfaradon, kaj lernu ekspluati la eblaĵojn de nia afiksaro. Ni ne vendu por unu manĝo nia unuenaskitecon.

Jam nun, kiam, celante sekvi la lastan modon, aliaj diras *trajno*, tiu, kiu (prave aŭ malprave) vidas en tio "distingon sen diferenco", bezonas moralan forton kaj kuraĝon diri *vagonaro*. Oni eĉ komencas provi *skolo* anstataŭ *lernejo* (tiel mortigante la nunan tre necesan vorton *skolo* en sia ĝusta signifo). Morgaŭ, sendube, oni pruvos sian ĝisdatecon dirante *kirko* anstataŭ *preĝejo*. Se ni amas Esperanton, ni rifuzos ĝin tiel mortigi, kaj fieros resti malnovmodaj. Gardu ĝin Dio kontraŭ amikoj—kontraŭ malamikoj ĝi gardos sin mem.

(k) Aparta demando estas tiu pri la malaj vortoj. Estas vere, ke kelkaj estas longaj, kaj ke la uzo de radiko unusilaba sparas tempon. Vere ankaŭ, ke pri du vortoj multaj emas heziti : ial *malfermi* ne ĉiam venas senpense en la kapon, kaj *malmola* havas molan sonon. Se la Lingva Komitato starigus fermitan liston de 5 aŭ eĉ 10 alternativoj por oftaj malaj vortoj, mi persone ne tro forte protestus. Sed ĉu tie la afero haltus ? La pogranda forigo de *mal* (kaj en la praktiko temas pri tio) estus katastrofo. Pli saĝa ol tio estus la forĵeto de la tutaj aro : *aperto* (kial ne *ovri* ?), *basa, disipi, dista, dura, fajna, febla, frida, lanta, leĝera, magra, morbo, noci, olda, pigra, plumpa* (ne= angla *plump*), *poltrona, prohibi, rara, sinistra, softa, streta, tarda, tenebro, trista, turpa*, k.a., kiuj, cetere, prezentes veran malfaciligon de la lingvo. Kaj mi neniom konsentas, ke la bela linio de Grabowski

### *La tago malvarma, malgaja, sensuna*

donas la impreson de "tago sunplena somera." Por mi tiuj malo-vortoj esprimas perfekte kaj pozitive—*malvarma, malgaja, sensuna* !

(l) Fine svarmas vortoj tute senutilaj aŭ alikaŭze forjetendaj : *Baĉeloro* (junulo), *botono* (burgono), *centurio* (homcento), *čizojo*, *dekado* (jardeko), *dokta* (klera), *drogmano* (interpretisto), *egardi*, *eskvizita*, *frištiko*, *gelo* (frosto), *gartero*, *humuro*, *kompano* (kunulo), *hripo*, *kuto* (jupo), *kvesti* (monkolekti), *lazarono*, *mentala* (mensa), *mimo*, *mitingo*, *ostenti*, *paseo*, *pelelo*, *prefaco*, *primavero* (printempo), *prominenta*, *resurekti*, *riporti*, *senioro*, *sepulti*, *simultana*, *siro*, *sozio*, *stiko*, *stopi*, *uvu*, *uzurpatoro*, *vasko*, kaj multego da aliaj.

Oni diras, ke la enkonduko de tia rubamaso prezentes nenian danĝeron, tial, ke la libro celas ne la novbakitojn, sed nur la perfektiĝintojn. Sed tiuj vortoj, se aŭtoroj ilin uzos, nepre trafoj kaj konfuzos ankaŭ la novbakitojn.

Oni argumentas, ke ĝuste kiel ĉiu teknikisto bezonas terminojn teknikajn, tiel same bezonas ilin la poeto, kaj ke oni do devas krei por la poeto kvazaŭ novan vortaron—"apartan lingvon"—same kiel angle, apud *horse*, *sea*, *meadow*, *forehead*, oni havas *steed*, *brine*, *main*, *mead*, *brow*. Sed kuſas tie sofismo. Pri teknikaj terminoj kiaj *cezuro*, *asonanco*, *adasismo*, *jambo*, *trioleto*, la komparo estas ĝusta. Sed proponante surogatojn por *maljuna*, *malrapida*, *malbela*, ĉu oni prave pretendas, ke temas pri vortoj nur teknikaj, specialaj por la poezio? Ili estas ja inter la plej ofte uzataj en la komuna lingvo.

Entute la verko estas altinteresa. Ĝi enhavas multajn bonajojn. Sed ĝia pledo por movaj radikoj estus pli forta, se la aŭtoroj forjetus 60% el siaj proponaĵoj. Uzate senkritike, la vortaro estus vera dangero por nia lingvo. La admonoj de nia Akademio havas la saman valoron en 1933, kiun ili havis en 1920:

"Por eviti la eblan disfalon de nia lingvo, estas necese, ke ĉiu Esperantisto, konsciante sian devon, sin korektu per interna, memvola, plej severa disciplino, inspirante al ĉiuj per sia ekzemplo profundan respekton al la lingvo Esperanto. Neniam oni tro firme konvinkiĝos, ke nian Esperantan lingvon oni devas konsideri kun sama respekteto, kiel niajn gepatrajn. Certe, neniu kuragus enkonduki sisteme kaj amase aŭ kaprice en ilin novajojn aŭ ŝangojn, ĉar tiumaniere oni fariĝus nur ridinda.

"La unua kondiĉo de normala progresado, la ĉefa kondiĉo de libera vivo, ne ŝajna, sed plena, estas tiu profunda respekteto, kiu malebligos, ke oni serĉu sen absoluta neceseco novan vorton aŭ esprimmanieron. Neniu, eĉ la plej konservema, malpermesas al ĉiu Esperantisto uzi novan vorton, se ĝin li nepre bezonas. Sed de ĉiuj ni rajtas postuli, ke novajon oni neniam enkonduku senutile kaj senbezone. . . . Ni devas esti tre singardaj kun ĉia perfektiĝado kaj riĉigado de la lingvo, kaj ni devas provi novajn vortojn nur en okazo de efektiva neceseco. . . . Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua."

M. C. BUTLER.

## CE COURSE IN OXFORD

As already announced, the Congress in Oxford will be followed by a Ce Course, which will be conducted by Pastro Ce himself. The course will be suitable for beginners, or for those who wish to learn the Ce method. It will be under the distinguished patronage of:—

Dr. Cloudesly Brereton, M.A., D.es-Lettres, Professor W. E. Collinson, M.A., Ph.D. Professor J. J. Findlay, M.A., Ph.D., John A. Peart, Esq., M.A., and Nowell Smith, Esq., M.A.

**The Provincionalo** will be given on the evening of Friday, April 14th, 1933, and this will be open to all, free of charge. The course of lessons will run from Tuesday, April 18th, to Saturday, April 22nd, inclusive, the hours being probably 9.0–1.0 and 3.0–5.0. The fee for the course is 10/- (7/6, if under 16), and this should be sent to the B.E.A. as soon as possible.

**Accommodation in Oxford.**—Details will be announced by the Congress Committee in due course. Accommodation bookings should be made through that Committee and *not* through the B.E.A.

**NOW READY =**

**FILLING A LONG-FELT WANT**

# **FACILA LEGOLIBRO**

**EDITED BY K. R. C. STURMER.**

This reader, in simple—but not childish—Esperanto, contains *précis* of nine important Esperanto novels, and interesting articles.

It is a splendid first reader for class-work, or for the isolated student.

64 pages. Price 1/-, Postage 2d.

*Published by*

**THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.**

*and obtainable from*

**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.,  
142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.**

**LA INTERNACIA FUMAJO!**



## **Cigaredo \_\_\_\_\_ Esperanto**

(The Esperanto Cigarette)

THESE CIGARETTES ARE WARRANTED  
HAND-MADE FROM A BLEND OF THE  
PUREST VIRGINIAN TOBACCOS, AND  
EVERY PRECAUTION IS EXERCISED  
IN THEIR PREPARATION TO ENSURE  
A UNIFORM & HIGH-GRADE ARTICLE

Price, per packet of 20,  
1/6, post free  
for 10 packets,  
14/-, post free

**OBtainable from the B.E.A.**

**SOLE PROPRIETORS:**

**BUCHANAN, SCOTT & Co  
Glasgow.  
(WHOLESALE ONLY).**

**1933**

**MARKS**

**OUR GREAT  
FORWARD  
MOVE.**

**READ THE ARTICLE**

**ON PAGE 1**

**AND**

**DO YOUR SHARE.**

## LINGVA KOMPARO

### HO, MIA KOR' !

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for !  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor' !

Ho, mia kor' ! Post longa laborado  
Cu mi ne venkos en decida hor' !  
Sufice ! Trankviliĝu de l' batado,  
Ho, mia kor' !

L. L. ZAMENHOF.

### O HEART OF MINE !

O heart of mine, cease, cease this anxious  
beating,  
Break not this weary breast with  
throb of thine !  
The moments madden me, though  
swiftly fleeting,  
O heart of mine !

O heart of mine ! Can failure keep  
repeating ?  
Will not some hour bring victory's  
grateful sign ?  
Sufficient ! Cease then thy despairing  
beating,  
O heart of mine !

R. W. ELAND.

### ACH DU MEIN HERZ !

Ach du mein Herz, schlag nicht so  
ungestüm !  
Du darfst mir aus der Brust nicht  
springen,  
Mich noch zu halten, will mir nicht  
gelingen,  
Ach du mein Herz !

Ach du mein Herz ! Werd' ich nach  
Arbeit siegen  
In der Entscheidungsstunde unter-  
liegen ?  
Genug ! Hör auf so ungestüm zu  
schlagen,  
Ach, du mein Herz !

MARIE HANKEL.

### ¡ OH, CORAZON !

¡ Oh, corazón, ya late con sosiego,  
Del pecho no te expulse la emoción !  
A sostenerme casi apenas llego.  
¡ Oh, corazón !

¡ Oh, corazón ! ¿ Tras larga mi jornada,  
Del triunfo yo tendré pronta ocasión ?  
Ya basta ; ten la paz ambicionada.  
¡ Oh, corazón !

JULIO MANGADA ROSENÖRN.

### O SERCE ME !

O serce me ! nie bij jak dzwon na trwoge,  
Nie skacz, jakby ci w piersiach bylo zle,  
Spokojnym byc ja dluzej nie moge,  
O serce me !

